



# ESPERO KATOLIKA

## KARAJ LEGANTOJ

*Kiel promesite, vi ricevas kun ĉi tiu kajero nian jarlibron 1961. Jes, ĉiuj niaj membroj ricevos ĝin, ankaŭ kvindeko da personoj kiuj ĝis nun, malgraŭ admonoj, forgesis pagi sian kotizon por 1960; tre urĝe mi petas ilin, nun tuj prizorgi tiun aferon kaj se eble samtempe la kotizon por 1961.*

*Ni ricevis multajn aplaŭdojn pro la aldono de la Nova Testamento, kaj ankaŭ multaj membroj lojale pagis la petitan ekstran guldenon aŭ eĉ pli grandan sumon. Tutkoran dankon al ĉiuj; samtempe mi memorigas pri tio la aliajn, ĉar kompreneble la ekstraj elspezoj estas tre grandaj, same kiel tiu por la jarlibreto.*

*Por la financa stato de nia unuiĝo vi vidu la jarlibreton p. 8/9, kie vi ankaŭ trovos la staton de nia membraro. Estas bedaŭrinde ke la membronombro malpliĝis pro diversaj kialoj: mi petas vin, fari propagandon por nia afero, montri nian revuon al katolikaj, eĉ nekatolikaj esperantistoj, por varbi novajn membrojn resp. doni al mi la adresojn al kiuj mi povus sendi provnumeron. Ĉu mi estas tro opitimista, se mi esperas, kun ĉies helpo, povi enskribi en 1961 la 2000-an membron-abonanton de I.K.U.E.?*

*Depost la antaŭa jarlibro anoncis sin 10 Dumvivaj Membroj: tio certe estas pruvo, ke oni havas plenan fidon en nia unuiĝo, resp. nia revuo, kiu ja ĉiam regule aperas. La enhavo plaĉas al multaj, laŭ la daŭre envenantaj aplaŭdoj: estas vere, ke envenas ankaŭ kritiko, sed estas tre malfacila afero, kontentigi ĉiujn: kio plej interesas unu parton, ne plaĉas al la resto. Ekzemplo: unuj skribas, ke la krucvortenigmoj estas tre lernigaj, eĉ formas bonegan studmaterialon por kluboj, aliaj opinias ilin sensencaĵo! Intertempe la lerta kompilantino de tiu rubriko, s-ino Li de Jong-Roobeek en Boskoop, kiu estas la nova kasistino de „Nederlanda Katoliko” post la morto de sia patro, nun solvis por mi alian grandan problemon! Pro la multaj novaj membroj, eksiĝoj, adresŝanĝoj, kreskado de la korespondado, la administrado, la mendoj de libroj, la ekspedo de E.K., la laboro entute vere fariĝis tro ampleksa, tiel ke mi ekster mia plena profesia tasko ne plu disponis pri libera kvaronhoro kaj devis neglekti miajn personajn interesojn. Mia 79-jara patrino fidele helpas min, sed vere la afero fariĝis por ni tro granda ŝarĝo. S-ino de Jong nun montris, ke ŝi ne nur scias krei enigmojn, sed ankaŭ solvi problemojn en tre efika maniero: ŝi grandanime ofertis, transpreni la tutan ekspedon de E.K. ek de la marta numero. La kuvertoj restos la samaj, do nur atenta observanto de la poŝtstampo rimarkos la ŝanĝon, kaj tial mi speciale volas mencii tiun fakton! Certe, ŝi komence iom hezitis, ĉar ŝi havas jam plurajn taskojn en nia movado kaj bezonos multan tempon por la ekspedo, sed ŝia edzo promesis helpi ŝin! Do tre koran dankon al gesinjoroj de Jong-Roobeek pro ilia efektiva helpo!*

*Mian alvokon rilate la forsendon de nia revuo al certaj landoj (relegu E.K. 1960, 201) respondis nur 3 personoj: bonvolu atente relegi ĝin kaj se eble peti 1-2 adresojn, al kiuj vi forsendos la ekstrajn numerojn kiujn vi ricevos por tiu celo. Plej koran dankon al ĉiuj helpemuloj!*

Truus Durenkamp.



Ĉar en la lasta numero apud: Postmeditadoj mi notis „A”, nun sekvu: 33. B. *Kio estas I.K.M. (Ikomo)?* En la jaroj 1948-1949 ekestis en *S. Gallen* (Svisujo) la Internacia Kristana Sociala Unuiĝo (*Ikosu*), kiu intencas formi katolikajn internaciajn sekciojn por la diversaj sociaj grupoj. En 1951 *Ikosu* decidis, ke estas necese fondi apartajn sekciojn por ĉiu socia grupo. El la kontakto de la mezklasaj unuiĝoj el Aŭstrujo, Belgujo, Francujo, Germanujo, Italujo kaj Nederlando, sub la verva gvidado de la nederlanda prezidanto *Koops*, finfine kreskis tio kion mi supre indikis per la literoj I.K.M. (= Internacia Katolika Mezklasmovado; oni do ankaŭ povus diri *Ikomomo* IKMM). Je 6-7-8 okt. 1956 okazis la internacia pilgrimvojaĝo

al Romo, kiu samtempe estis la unua kongreso de la I.K.M.

De tiam oni regule kunvenis. La hodiaŭa sekretario estas s-ro *Fons Margot*, Spastr. 12, Bruselo.

*La celo.* La 9an de okt. 1959 la regularo de la I.K.M. estis fiksata en *Friburgo en Br.* La I.K.M. alcelas:

- 1.—Esti internacia kunlabor korporacio de la kunigitaj katolikaj organizoj de entreprenantoj en la mezaj kaj malgrandaj profesioj;
- 2.—Akceli ke en la socia kaj ekonomia ordigo de la internacia societo la pozicio de la meza kaj malgranda entreprenoj kaj la profitoj de la memstaraj entreprenantoj en tiu profesio estu garantiataj;
- 3.—Akceli ke la katolika sociologio estu realigata en la socia kaj ekonomia ordigo de la internacia societo;
4. - Akceli ke katolikaj organizoj de mez- kaj malgrandentreprenantoj estu fondataj;
5. Sed el la praktiko montriĝis ke la tasko de nia organizo ankaŭ estas, flanke de kaj kune kun la aliaj sociaj organizoj, kontribui la parton de la mezklaso en la pligrandigo de la nuntempa kaj aktiva katolika komunumo sur ĉiuj terenoj de la homa vivado, ekz. rilate la ne-katolikojn kaj la popolojn de la ekonomie malprogresintaj landoj: kunlaborado, apostolado, karita agado. Pro tia respondeco ni devas progresi en membronombro, laborfortoj kaj preteco al agado, kiu rezultas el la viva konscio de la universala misio de la Eklezio.

Jen, karaj legantoj, kion mi, tre koncize, transprenis el longa artikolo de la sekretario de I.K.M. en la nederlanda gazeto por la katolika mezklaso „*La Kern*” de dec. 1960. Li priskribas kion oni jam sur tiu kvinobla tereno atingis, tro longe por ĉi tie transskribi. Oni jes havis multajn kontaktojn, kongresojn, studtagojn; la sekretario ekz. memorigas organizojn de gejunuloj de la mezklaso kaj burĝaro kiel en Francujo, Luksemburgo, Hispanujo, Portugalujo, Kanado, la proksima Oriento kaj Latina Ameriko. Li esprimas la esperon (sed ne esperantlingve!) ke venos la tago, kiam la I.K.M. povos mondscale realigi sian taskon kaj mision, ekz. per „kernoj” kiuj, kune kun alikreduloj, faros digon kontraŭ la ateista materialismo, kiel jam la Internacia Kristana Sindikato montras la vojon laŭ kiu oni enkonduku la fermentpaston de nia doktrino en la mondon de „alipensuloj”. Tiucele la sekretario ankaŭ ĉeestis kunvenon okaze de la Eŭkaristia Kongreso en Munkeno en kiu, por ĉ. 50 sociologoj kaj organizuloj estis pritraktata la temo: „La forma forto de la Eklezio en la nova Eŭropo”; la celo estis: penado al celtrafa koordigo de ĉiuj katolikaj fortoj en la al unueco kreskanta Eŭropo, kun atento al la komuna misio en la tuta mondo.





## La 29-a IKUE-kongreso 1962 apud Romo



La foto prezentas kelkajn anojn de la Katolika Esperanto-Centro en Romo, inter kiuj parto de la L.K.K. por nia 29-a en 1962. De maldekstre: no. 2: s-ro Ruggiero Francesco, sekr.; 4: s-ino Luisa Terrazzini; 5: s-ro A. G. Fontanive; 6: s-ro Aŭgusto Kohler, vicprez.; 7: Patro Giacinto Jacobitti O.P., la LKK-prezidanto, kiu modeste preskaŭ kaŝas sin; 8: s-ro Ermanno Filippi, kasisto; 9: s-ro Luigi Minnaja; 10: s-ro Alfonso Pitroch; 11: s-ino Adelaide Antonelli; 13: s-ro studento Fabrizio Pennacchietti; 14: s-ro studento Antonio De Salvo. Sur la foto mankas jenaj LKK-anoj: ŝ-ino Mercedes Roca; s-roj Angiolino Gennaro; Franco Galbusera; Luigi Boscarino kaj Arturo Martellotta.

### ESPERANTO : GRAVA KOMERCA LINGVO.

Kun la permeso de la skribinto, jen kelkaj linioj el letero:

Mia birdbredada profesio tute okupas min, kaj ne lasas al mi liberan tempon por miaj ŝatokupoj, inter kiuj precipe Esperanto estas notinda. Lastatempe mi spertis ke Esperanto ne nur estas amuzo, sed krome granda internacia helpo kaj servo. Ekz: Post la kongreso mi vizitis Nederlandon, kaj dank' al Esperanto, mi havis la eblecon viziti kelkajn bredejojn, en kiuj mi trovis bonajn kaj interesajn kokidojn, el kiuj mi nunmomente aranĝas importon de 7.000 kokidoj al mia lando (t.e. Hispanujo). Ankaŭ mi dankas la alvenon de amiko John en Hispanujon, al Esperanto. Li bone helpas min pri la seksdistinga afero.....

J. F. Lérida - Hispanujo.

---

La aŭtoro konstatis kiel grandampleksa estas la misio en internacia plano kaj: kiel konsternante nesufiĉa ĝis nun estis la agado de la I.K.M. Ĉu por ni ne estos la konkludo: unu el la plej gravaj kaŭzoj de la malsukceso aŭ tro malgranda sukceso estis la lingva bariero? Kaj, dua konkludo: ĉu, precipe la mezklasuloj inter ni, sed ankaŭ ni ĉiuj kiel katolikoj, ne alportos pluan venton por nia esperanta muelilo?

Paroĥestro C. A. Ouwendijk, Rijpwetering, Nederlando.

## KONKURSO PRI PROPAGANDA AFIŜO

La Informa Fako de Universala Esperanto-Asocio intencas eldoni en aŭtuno du trafajn propagandajn afiŝojn: unu en formato de proksimume 82 x 59 cm. kaj la alia en formato 58 x 42 cm. Por ke la afiŝoj estu kiel eble plej celtrafaj, la I.F. de U.E.A. organizas internacian konkurson laŭ jenaj principoj:

1. La projektoj de la afiŝoj devas esti kiel eble plej modernaj, okultrafaj, allogaj, prezentantaj simbole la celon de la Internacia Lingvo kaj instigantaj al la lernado de Esperanto.
2. Krom la koloro de la papero, sur kiu la afiŝo devos esti presata, ĝi havu maksimume 3 kolorojn.
3. La afiŝo estu aŭ sen teksto aŭ kun la vortoj: *Internacia Lingvo Esperanto*. Kun tiu teksto la afiŝo prezentu kompletan tuton, uzeblan sen iu ajn plia teksto. Tamen, ĉiu afiŝo estu tiel farita, ke, se necese aŭ dezirinde, troviĝu sur ĝi konvena spaco sur kiu estos eble presigi plian mallongan tekston en iu nacia lingvo. Nur por orientiĝo de la konkursantoj estas oportune diri, ke tiu eventuala naci-lingva teksto kies presigon prizorgos, se necese aŭ dezirinde, la landaj asocioj, lokaj grupoj aŭ aliaj utiligantoj de la afiŝoj, enhavos ekzemple indikon pri komenciĝo de novaj kursoj, aŭ ĝeneralan alvokon lerni Esperanton, aŭ similan instigon.
4. La projektoj de la afiŝoj devas esti sendataj al la adreso: Loka Kongresa Komitato de la 46-a Universala Kongreso de Esperanto, Harrogate, Yorks., Britujo, plej malfrue ĝis la 30-a de junio 1961. Ili devas esti bone enpakitaj kaj prizorgitaj kontraŭ difektiĝo. La I.F. de U.E.A. kaj la L.K.K. en Harrogate plej atente manipulos la projekton, sed nek U.E.A. nek la L.K.K. respondecas pro eventuala difektiĝo aŭ perdo.
5. Dum la U.K. en Harrogate okazos aparta ekspozicio de ĉiuj projektoj kaj komisiono, konsistanta el la ĝenerala sekretario de U.E.A. kaj 4 membroj, kiujn elektos la Komitato de U.E.A., decidos pri la plej bonaj projektoj, kiuj estos presataj. Estas ebleco, ke la tuta Komitato de U.E.A. faros pri tio decidon. La projekto aŭ projektoj, kiuj estos presataj, ricevos premion de minimume po 15 anglaj pundoj, kiu sumo inkluzivas ĉiujn aŭtorrajtojn. La nepremiitaj projektoj estos resendataj aŭ redonataj al la aŭtoroj.
6. En la konkurso rajtas partopreni ĉiu esperantisto aŭ amiko de Esperanto per tiom da projektoj, kiom li aŭ ŝi deziras.

La I.F. de U.E.A. alvokas ĉiujn profesiajn kaj amatorajn artistojn, esperantistojn aŭ amikojn de Esperanto, partopreni en la konkurso kaj tiamaniere helpi al publikigo de vere elstara afiŝo, kiu siavice kontribuos al la plua disvastigo de la Internacia Lingvo.

Por la Informa Fako de U.E.A.

*D-ro Ivo Lapenna*

---

*La homoj similas la vinojn: la aĝo acidigas la malbonajn kaj plibonigas la bonajn.*  
Cicero.

*Ni ŝatas ke oni krude diras sian opinion, kondiĉe ke ni samopinias.*

*Mark Twain.*

*Oni ne multon efektivigas per la kredo, sed sen ĝi nenion!*

*Samuel Butler, angla satiristo.*



## SOLENA MEMORIGO DE ZAMENHOF ĈE LA KAPITOLO EN ROMO

La 24-an de novembro 1960, je la 18-a horo, havis lokon en Romo la jam anoncita memorigo de Zamenhof en la historia salono de la Bustoj en la Kapitolo, laŭ iniciato de la Internacia Komitato por la Unueco kaj la Universaleco de la Kulturo, en la kadro de la manifestacioj rekomenditaj de UNESKO.

Je la nomo de la *Urbeŝtraro de Romo* portis saluton la *skabeno D'Andrea*, kiu poste lasis la lokon al la eksterlanda Prezidanto de la Komitato mem, *ambasadoro de Britujo*. Ĉi tiu, en mallonga enkonduka parolado en itala lingvo, klarigis per tre flataj vortoj la motivon kaj la altan signifon de la manifestacio. Sekvis la Ĝenerala Sekretario de la Komitato, verkisto kaj *eks-deputito Eugenio Coselschi*, kiu per varmaj, entuziasmaj, konvinkaj esprimoj vekis la viglan atenton de la aŭskultantaro, konsistanta el proksimume 300 personoj, pliparte ne esperantistoj. Fine, faris la festparoladon *prof. Carlo Agostini*, kiu, dirinte kelkajn vortojn pri Zamenhof kaj ties idealo, skizis la genian verkon de li kreitan, ilustrante per originalaj argumentoj ĝian grandegan simplecon, ĝian nekontesteblan gravecon por la pliproksimigo de la popoloj, la rekonon fare de la plej altaj instancoj kaj la nunan staton de la Esperanto-movado, kiu meritas esti pli kaj pli kuraĝigata de ĉiuj por atingi la altan, homaman celon, kiun Zamenhof, ek de la junaĝo, proponis al si.

La brita ambasadoro, evidente tre favore impresita de la vortoj de *prof. Agostini*, bedaŭrante, ke li ne povas esprimiĝi en Esperanto, varme dankis la oratoron je nomo de la Komitato, kaj esprimis la deziron, ke la nobla aspiro de la esperantistoj baldaŭ realiĝu. Sur la podio troviĝis ankaŭ la *ambasadoro de Pollando*, kaj la itala esperantista pioniro *Ekscelenco advokato Raffaele Bagnulo*, veninta por la okazo el *Bologna*. Inter la invititoj ĉe la unua vico sidis la *ambasadoro de Kolumbio*, *ambasadorezino de Peruo*, kaj la *bulgara kultura ataŝeo*.

Inter la esperantistoj troviĝis larĝa reprezentantaro el *Bologna* kaj *Trieste*.

Ornamis angulon de la salono, flanke de la podio, granda reproduktaĵo de la hungara poŝtmarko kun la kapo de Zamenhof.

Sendis aliĝtelegramojn la *ministroj: Bosco*, pri publika instruado; *Andreotti*, pri Defendo; *Gonella*, pri Justico; *Jervolino*, pri Komerca Ŝiparo; la vicministro pri Publika Instruado, *Elkan*, kaj aliaj aŭtoritatoj.

La radio kaj la televido amplekse raportis pri la manifestacio.

Post la celebrado en la Kapitolo, sesdeko da esperantistoj, kune kun s-ro *Coselschi* kaj kun la bulgara kultura ataŝeo, kuniĝis por komuna vespermanĝo en apuda restoracio. Post la ŝaŭmvino la Prezidanto de la Roma Esperantista Grupo, *kolonelo Fontanive*, al kies entuziasma agado oni ŝuldas la organizadon de la bonege sukcesinta ceremonio, dankis ĉiujn kunlaborantojn, kaj aparte s-ron *Coselschi*. Ĉi-lasta, siavice, faris alian brilan paroladon kiel varma subtenanto de la Esperanto-movado, promesante meti sian tutan agadon je dispono por atingo de konkretaj rezultoj.

El: „*Esperanto*”, januaro 1961.

---

### *Niaj belaj paskokartoj*

kun Esperanto-teksto estas haveblaj ĉe nia Libro-Servo. Prezo po 0,20 ned. gld.  
= 0,80 stelo kun kuverto.

## JOSEPH, KARDINALO WENDEL †

La tuta katolika mondo konsterniĝis je la unua tago de la nova jaro, eksciante la morton de Kardinalo Joseph Wendel, ĉefepiskopo de Munkeno, en la aĝo de 59 jaroj. Post sia prediko en la ferma soleno pri la jaro 1960, la kardinalo subite mortis. La centmiloj da katolikoj el ĉiuj mondpartoj, kiuj ĉeestis la Eŭkaristian Kongreson en aŭgusto pasinta, inter ili multaj IKUE-anoj, plurfoje vidis kaj aŭdis la energian prelaton.

Kardinalo Wendel estis simpatianto de nia movado; en 1958 li permesis aŭdiencon al kelkaj IKUE-anoj kiuj prezentis al li la Memorlibron de la 3a Eŭkaristia Esperanto-Mondkunveno en Rio de Janeiro, verkitan de la ĉina Patro Johano-Baptisto Kao o.f.m. kaj samtempe parolis pri la intenco, aranĝi IKUE-kunvenon en la kadro de la Eŭkaristia Kongreso, kiel 4-an E.E.M.K. Je tiu okazo Kardinalo Wendel montris sian simpatian por nia movado. (vidu E.K. 1958, 42).

Laŭ deziro de Kardinalo Wendel estas starigita en la katedralo de Munkeno altaro de Pio X-a, patrono de la katolikaj esperantistoj; jam kelkfoje kunvenis tie samideanoj por ĉeesti S. Meson.

Ĉiuj IKUE-anoj danke memorigu la simpatian Princcn!

## PATRO JULES MEULEMANS W.P. †

La 21-an de decembro mortis en Antverpeno, en la aĝo de 80 jaroj, Patro Jules Meulemans, de la Blankaj Patroj de Kardinalo Lavigerie. Li lernis Esperanton en 1959, en la aĝo de 79 jaroj, kaj jam tuj estis entuziasma adepto de nia movado. Multajn jarojn li laboris en Kongo, de kie li revenis en marto 1960 por libertempi. Tuj li komencis verki Esperantan lernolibron en „Kiswahili“, la ĉefa lingvo de Afriko, kiun li perfekte konis.



*Patro Jules Meulemans kiel gasto en la familio De Roover.*

En aŭgusto Patro Meulemans malsaniĝis, komence de septembro devis submeti sin al urĝa operacio je la stomako, kiu bone sukcesis. Li intencis reiri al Kongo antaŭ la jarfino, kunporti sian tiam finverkitan lernolibron kaj fervore propagandi Esperanton en Afriko. Dio tamen decidis alie: revenis la plendoj pri la stomako, en decembro dua operacio estis necesa, kiun la maljunulo kuraĝe kaj senplende suferis. Nia propagandisto s-ro Rik de Roover, kiun la Patro kelkfoje vizitis en lia hejmo, reciproke regule vizitis la malsanulon;

post la dua operacio tiu montris la malneton de sia parte verkita lernolibro, petis prizorgi la IKUE-kotizon por 1961 kaj mendis ankoraŭ du verkojn sur lingva tereno. Du semajnojn poste li tamen mortis, preskaŭ neatendite.

Certe nia fervora samideano jam ricevis la eternan rekompencan por sia oferplena vivo. La ekzemplo de la junkora maljunulo instigu multajn el ni al pli fervora agado.



## RUDOLF KAFTAN †

*La horloĝ-muzeo de la urbo Vieno, vera specialaĵo, unika kolekto de plej diversaj horloĝoj, grandaj, eĉ gigantaj, ĝis plej malgrandaj etaj artaĵoj, orfiĝis.*

*Ĝia fondinto kaj dumviva direktoro — laŭprofesie li estis mezlerneja profesoro — kvazaŭ „patrece” zorgema pri siaj amataj mekanike vivantaj adoptitaj „horloĝ-infanoj”, Rudolf Kaftan, mortis merkrede la 4an de januaro 1961 en la 91a jaro de sia vivo.*

*La mortinto estis ankaŭ la nestoro de la Viena resp. aŭstria esperantistaro, al kiu li apartenis dum 50 jaroj. Iam li ankaŭ gvidis sukcesajn kursojn. Ankoraŭ ĝis en la lastaj jaroj li persone gvidis ne malofte grupojn de esperantistoj tra la horloĝ-muzeo, klarigante ties intereseĝan enhavon en nia internacia lingvo.*

*Ĉe lia — de la urbo Vieno dediĉita honora tombo — funebris krom lia vidvino kaj parenkaro ankaŭ la Viena samideanaro. Nia sac. komandoro P. Plank plenumis la eklezian entombigan ceremonion al nia samcelano, kiu estis fidela katoliko kaj en pli frua tempo, se iel eble, ĝoje partoprenis la Diservojn de AKLE, kunpreĝante kaj kunkantante en Esperanto. R.I.P. — W.M.*

*Niaj infanoj kaj ni... rigardu ilin, kiel ili vere estas!*

*Ili posedas apartajn inklinojn.....*

*Normo estas: Ili estas infanoj, ni estas plenkreskuloj. Se iafoje okazas, ke ni estas kiel „grandaj infanoj”, ili kontraŭe neniam estas „malgrandaj plenkreskuloj”. Ili posedas la samaĝulajn interesiĝojn.*

*Se mi lin permesus, li ĉiun dimanĉon forpasigus prilaborante lignon.....*

*Ĝoju do! Kulturu la preferojn de viaj geknaboj. Estas ja iliaj inklinoj kaj naturdotoj, iliaj apartaĵoj, kiujn ili ĉiam ŝatos, kiuj ilin savos el la monotoneco de la okupoj, al kiuj ili grandiĝintaj estos devigataj.*

*Li ŝatas, ke ni interesiĝas pri lia farato.....*

*Vi estas bonŝancaj, ĉar vi povas teksti firmajn kunigilojn kun via infano, parolante pri liaj okupoj. Diskutu kun li, donu iom da helpo. Tiamaniere nia filo aŭ nia filino fariĝos nia amiko kaj kunulo. Se vi scias labori kaj ludi kun ili, viaj konsiloj kaj eĉ viaj punoj pli facile trovos la vojon al ilia koro.*

*Mi volas, ke li finfaru, kion li komencis!*

*Bonega principo... sed atentu! Kiam ni diras, ke Petro nur „komencis” fari sian poŝtmarkan kolekton, ja estas ni, plenkreskuloj, kiuj parolas. Nu, ni kiel nejunuloj opinias pri kolekto... ni tuj pensas pri kolektego. Petro kontraŭe estas junulo, kaj komencinte sian kolekton debuton, kiel vi diras, li eluzis sian tutan nunan interesiĝon. Finata estas lia kolekto, almenaŭ ĝis nun. Tiam permesu, ke li sin okupas farante aliajn aferojn! La ŝanĝo konvenas al la samaĝuloj.*

*Li senorde kuŝlasas ĉion!*

*Almenaŭ du specoj de malordo ekzistas: unu devenas de vera „maldiligentemo”, egoismo, malriĉa volforto — kaj tre ofte de malbona edukado! La alia rezultas de intense vigla inteligenteco kaj de granda ardo en la faro. Ĉiel, la ĉambro de la geknaboj ne estu necese montrinda al vizitantoj!*

*El: „La Revue Educatrice”, Parizo, tradukis B. Jahier.*



**MAROKO.** La famkonata esploristo, s-ro *Tibor Sekelj*, venis en oktobro 1960 al Maroko, laŭ invito de s-ro *Charles Thollet* kaj de la marokaj esperantistoj. Li faris du franclingvajn prelegojn en la ĉefurbo *Rabat*, nome en la Universitata Urbo kaj en la Fakultato de Sciencoj, kiun lastan ĉeestis la rektoro de la universitatoj de Maroko, s-ro *Mohamed el Fasi*. El la 140 ĉeestantoj rezultis ĉ. 50 lernantoj de 2 Esp.

kursoj, gvidataj de f-ino *Elsie Parson*, kiu ankaŭ dufoje ĉiusemajne iras al *Kenitra* por gvidi kursojn por komencantoj kaj progresintoj. Ankaŭ s-roj *Thollet* kaj *Moutet* gvidas po unu kurson en *Kenitra*.

S-ano *Sekelj* parolis dum sia restado en Maroko pri Esperanto kun pluraj alt-ranguloj en tri ministrejoj kaj en la universitato. \*

**ITALUJO.** La Ĉambro de Komerco, Industrio kaj Terkulturado de *Vercelli* malfermis la Kvinan Ekspozicion de la agadoj de la Provinco *Vercelli*. La loka Esperanto-grupo partoprenis al la ekspozicio kun fotografajoj, turismaj broŝuroj kaj aliaj propagandiloj; la prezidanto de la grupo, s-ro *Luigi Praglia*, parolis kun *Ministro Giuseppe Pella* kaj aliaj aŭtoritatoj pri la internacia lingvo kaj nia movado; profesoro *Sola* donis al *Ministro Colombo* la adresaron de Esperanton uzantaj firmoj, eldonitan de la Milana Grupo. La eminentuloj afable aŭskultis kaj montris grandan interesiĝon. \*

**HISPANUJO.** La ĉiam vigla Esperanto-Grupo de *Moyá* (prov. Barcelona) aperigis tradukon de nia artikolo „Kristnasko en la jaro...” (E.K. 1960, 202) en la regiona revuo „*Tosca*”. Eta parto de la sama artikolo aperis en la lerneja revueto „*Crisol*” de la urbo *Sama de Langreo*; ambaŭ menciis nian revuon. Tiaj tradukoj kun mencio de fonto estas indirekta propagando: ni ree atentigas, ke al ĉiu estas permesate, traduki artikolojn el *Espero Katolika* por nacilingvaj revuoj, kondiĉe ke oni menciu la fonton. \*



*S-ro Rik De Roover instruas*

**BELGUJO.** S-ro *Rik De Roover* nia fervora propagandisto, profesia instruisto, regule instruas Esperanton en sia hejmo al grupo da infanoj. Lia edzino, mem vigla esperantistino, volonte subtenas liajn klopodojn. La foto montras nian samideanon kaj atentan grupeton da lernantoj. S-ro *De Roover* ankaŭ gvidas kantgrupon, en kiu infanoj kantante en Esperanto konatiĝas kun nia lingvo. (Vidu alvokon por Antverpenanoj en ĉi tiu kajero.)

Certe multaj el niaj legantoj jam konas la nomon kaj adreson de s-ro *De Roover*, kiu preskaŭ ĉiumonate lokigas „*Urĝan Alvokon*” en nia revuo al personoj, kiuj volas disdoni diverslingvajn flugfoliojn pri Esperanto en internaciaj katolikaj, ne-esperantistaj kongresoj. \*





**ARGENTINO.** Lia Kardinala Moŝto *Caggiano*, ĉefepiskopo de *Buenos Aires*, entreprenis grandskalan evangelian laboron en sia diocezo, kiu ampleksas pli ol mil urbojn kaj vilaĝojn, kun loĝantaro de 7.000.000. Pli ol 2000 sacerdotoj, mil el ili eŭropanoj, venintaj pro la manko de animzorgantoj en tiu diocezo, komencis la gigantan taskon, post longa prepara laboro, ankaŭ de miloj da laikoj, kiuj ricevis specialan instruon kaj vizitis jam pli ol 800.000 familiojn por instigi ilin al partopreno de tiu kvazaŭ „ĝenerala Misio“.

La agado laboras sub la devizo: „Dio estas mia forto“; multaj eminentuloj, inter kiuj la famkonata *Msro. Fulton Sheen*, kaj *Msro. Casimiro Morcillo*, episkopo de *Zaragoza, Hispanujo* (membro de IKUE!) donis sian kunlaboron. M-sro. *Morcillo* iris al *Buenos Aires* kun 200 hispanaj sacerdotoj, speciale preparitaj por tiu misia laboro. La preso, radio kaj televido multe kontribuis en la serioza preparo al la entrepreno, kiu signifos grandan vekigon al pli intensa religia vivo: pro la manko de sacerdotoj granda parto de la loĝantaro laŭnome katolika, ĉiuj baptitaj, vivas en nescio pri la religio, ne ricevas la sakramentojn kaj estas viktimo de superstiĉo kaj de la spiritismo. \*

**ANGLUJO.** La 70-jara *f-ino Marcia Moore*, aĉetis grandan vilaon „*Warren Wood*“, ĉirkaŭatan de vasta parko, modernigis kaj rekonstruis ĝin, kaj destinis ĝin al hejmo por infanoj el kampoj por rifuĝintoj. La karita fondaĵo „*Ockenden Venture*“ kontaktis *f-inon Moore*, kaj la fondintino de nomita entrepreno, *f-ino Joyce Pearce*, kiu jam venigis multajn da tiaj infanoj al Anglujo, donante al ili loĝejon kaj instruon, proponis helpi *f-inon Moore*, kiu intencas ekloĝi en eta domo en la parko „*Warren Wood*“ por povi rigardi la progresojn de sia verko. La infanoj ekloĝos en la novan hejmon je Pasko. \*

**USONO.** La usonaj katolikoj grandskale subtenas la Eklezion en Latina Ameriko, sendante grandajn sumojn al la Pontifika Komisiono „*Por Latina Ameriko*“, kiu prizorgas la edukadon de sacerdotoj en tiuj landoj. En unu jaro ili helpis 413 teologi-studentojn kaj la Komisiono anoncis pluajn donacojn de la katolikoj en Kanado por 40 studentaj lokoj, kaj krome por 52 studentoj el donacoj de la diversaj universitatoj de Romo. \*

*Pres-Agentejo de Pli Bona Mondo, Rocca di Papa, Italujo.*

## NI GRATULAS

*S-ro Jacques Tuinder*, eksredaktoro de la junulargazeto „*Birdo*“, kaj *f-ino Vera Dekker*, ambaŭ fervoraj esperantistoj, kiuj konatiĝis dum la 44-a U.K. en *Varsovio*, geedziĝis 25.1.1960 kaj nun loĝas *Marktweg 95, den Haag, Nederlando*. Dio benu la simpatian paron! \*

*S-ro Karl-Ernst Salzmänn*, *Unterweg 10*, kaj *f-ino Helga Hasenohr*, *Königslacher Str. 38*, ambaŭ en *Frankfurt am Main, Germanujo*, estas gefianĉoj de post *Kristnasko 1960*. Ni gratulas niajn gesamideanojn kaj deziras al ili feliĉon. \*

*S-ro Nicola Minnaja*, la ĝenerala sekretario de TEJO, doktoriĝis „*Summa cum laude*“, en la aĝo de 22 jaroj. Ni tutkore gratulas nian „denaskan“ samideanon, ties gepatrojn kaj parencojn.

## *Kaj tamen li pardonis . . . .*

Batis la kvinan en la turo. Unu post la alia mi nombris la sekajn sonorilbatojn. Kvinfoje sinsekve. Ankoraŭ unufoje mi turnis min sur la alian flankon: ĉio kion mi povis fari estis ekscitplena dormetado.

Iu sonorigis.

Tutvekita mi saltis el la lito. Mi kuris ĝis la fenestro kaj brue malfermis ĝin. Estis okazonte do!

Mi vestis min. Estis malfacile. La ĝusta butono ŝovis tiel malvolonte tra la ĝusta butontruo. Miaj fingroj tremetis. Tiel estas ĉiam, k'am mi devas pli rapide ol mi povas. Estis okazonte do!

Kune ni iris trans la strato. La fratino de mia mortanta amiko kaj mi. Rapide kaj paŝete. Ekstere estis nebule. En mia interno same. Mi tremis.


La pordo estis fende malfermita. Kvazaŭ por sacerdoto kiu estas atendata kun la sankta oleo. Sed mia amiko ne atendis sacerdoton. Neniam mi tiom intense sentis ke li ne estas kristano. Li estis judo. Ĝuste nun mi realigis al mi ke li alie opinias ol mi. Mi amis lin kiel miajn fratojn. Li estis bona homo. Honesta kaj profunda, kaj krome ankaŭ bona.

Lia edzino flankenmetis la medikamentojn de la seĝo apud lia lito. Ankaŭ la glason da varmeta akvo, en kiu troviĝis la termometro. Mi eksidis, forgesante demeti mian surtuton. Li ekkaptis mian manon. Mirige trankvile kaj singarde. Mi mem konfuziĝis pro nervostreĉo.

„Karlo“, li diris kun trankvila prudento, kiun mi neniam estis spertinta ĉe li, „mi estas nun sesdekjara. Ne plu eblas refari la vojon laŭ kiu mi jam iris. Tiom da travivaĵoj nebuliĝas post kiam ili glitis en la pasintecon. De unu afero tamen, el ĉio kio nun preskaŭ por ĉiam estas for, neniam mi liberiĝis. Mi spertis Daĥaŭon“.

Mia amiko silentis. Silento ŝarĝita de terurega ĉagreno. Mi sentis ĝin.

„Oni uzis min kiel provbeston“, li daŭrigis. „De tiam mi paŝas kun bastono, kaj profunda tranĉo troviĝas en mia tibikarno. Restis malfermita vundo, kiu daŭre memorigis min al la nekredebla infero de Daĥaŭ. Milojn da kalvrazitaj amikoj mi vidis formorti pro ftizo.“





Ili iĝis malrekt- kaj kurbkreskaj. Ili iris nudaj, sed ilia nudeco ne ravis. Ĝi eligis abomenon kaj senpovan amarecon. Virojn kaj virinojn, kaj inter ili infanojn, mi vidis eniri en la mortaŭtomobilojn; oni forkondukis ilin al la gasfornego, kvazaŭ bestojn al la buĉejo."

Duan fojon mia amiko faris paŭzon. Mi komprenis lian silentadon. En tiu longa vico de mortkondamnitaj li vidis preterpaŝi sian patron, sian patrinon, sian plejaĝan fratinon .... Lacokule li rigardis sian plej junan fratinon apud li. Ili estis la nuraj postrestintoj de bela familio. Ŝi ploretis, kaj dume ŝi streĉokule rigardis la malnovan familioportreton malantaŭ la ligna lito. Li sopiris. „En tiu infero mi havis amikon", li diris poste. „Lia nomo estis Karlo, same kiel la via. Ankaŭ li havis bluajn okulojn, kaj kiam li venis li estis tiel forta kiel vi. Li enpaŝis la mortaŭtomobilon kvazaŭ homa ruinaĵo. La unuajn tagojn kiam ni kune dormis sur la malglata betono, mi ne povis pardoni al li, ke li fariĝis katoliko.

Mi riproĉis tion al li, kaj mia riproĉo suferigis ankaŭ min mem. Mi tre amis lin, ĉar li estis honesta. Honestaj kaj profunda. Iun matenon oficiro kraĉis lin sur la vizaĝon kaj piedbatis lin. Li estis malpuriginta la angulon de nia ĉelo, ĉar li estis malsana kaj nia kruĉo estis plenplena... Li ekploris sub la kruda ĉevalkovrilo, kiam tiu sama oficiro moke demandis lin pri kio li pensas.

„Mi sentas, — li diris —, kiom malfacile estas ami ĉiun, kiu malbonfaris al ni. Kristo kelkfoje deziras dolorigajn aferojn".


Per siaj pezaj armebotoj tiu sama ulaĉo denove piedbatis lin. Ankaŭ min. Mi neniam plu revidis Karlon. Neniam plu mi riproĉis al li esti kristano. Li sciis kial."


Ĉi tie li denove silentis. Penigis al li plue paroli. Lia korpo elĉerpiĝis, sed liaj pensoj daŭre interluktis.

Ĝuste nun mi sciis kial li estis aminta min tiom. Bedaŭrinde mi neniam tiel profunde komprenis tion.


Li denove kaptis mian manon kaj premis ĝin kiom eble plej forte. Mi sentis kiel liaj ungoj tranĉis en mian manplaton, sed mi ne volis retiri ĝin. Tiu momento estis tro sankta.

„Karlo", li tiam diris sopire, „mi ne estas katoliko. Pardonu min, sed pri iu Dio kiu iĝis homo, mi ne kapablas kredi. Mi provis tion, sed sensukcese. Vi estas





*Radiogramo de la kruoj de Barbara  
Pietszyk post la vivisekcio.*



*Vundoj en la kruoj de Maria G.  
post la vivisekcio.*

romkatolika. Mi tre envias vin. Tion tamen mi lernis de vi ambaŭ, kvankam vi neniam tiamaniere parolis pri ĝi al mi: Por pasie malami oni devas esti homo. Por same pasie ami, tamen ne sufiĉas esti homo. Tiam oni devas esti kompreninta Kriston. Mi ne kapablas kredi, ke Li estas Dio. Pri la amo, nur Li parolis la veron."

Li fermis la okulojn. Lia premo pli kaj pli malfirmiĝis, ĝis lia mano falis sur la blankan littukon. Mi vidis lian kapon gliti flanken. Ĉiam pli.

Tiam li leviĝis kvazaŭ lastan fojon. Tute rigide. „Mi pardonas”, li diris. „Ankaŭ al vi, doktoro Heinz!”

Mia amiko estis morta. Ni ne plu havis la forton por plori. Nek lia edzino. Nek lia fratino. Nek ankaŭ mi.

En la preĝejo mi sidis ploranta.

Unu semajnon poste, en la malfrua vespero, mi relegis la raporton pri Dohaŭ. Dolorigis min. Naŭzige terure!

Kaj tamen ekzistis homoj, kies amo estis pli granda ol tiu senlima malamo.

Tiuj maloftuloj komprenis pli ol ni, kial Kristo neniam iĝis reĝo sur la tero, sed elektis la krucumiĝon. Nur la krucamo estas pli forta ol kiu ajn di'abla malamego.

*Esperantigis Rik de Rover, el la flandra katolika revuo laborista „Raak”,  
kun permeso de la Redakcio, kiu aĝable pruntis la kliŝojn.*





## 46-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Harrogate - Britujo  
5-12 aŭgusto 1961

ALTA PROTEKTANTO:  
LORDO BOYD-ORR, M.A., M.Sc.,  
F.R.S. NOBEL-PACPREMITO

**Korespondadreso :** 46-a Universala Kongreso de Esperanto - Harrogate.  
**Telefono :** Harrogate 4685  
**Telegrafo :** Esperanto Harrogate.  
**Banko :** Midland Bank Ltd. Harrogate

**N-ro 5**

**OFICIALA KOMUNIKO**

**januaro 1961**

*FAKKUNVENOJ* i.a.:

Internacia Elektrista Asocio. Adreso: Prof. D-ro H. S. Kozłowski, Warszawa 12, ul. Baluckiego 20 m. 8, Pollando

Internacia Asocio de Juristoj-Esperantistoj: „La personeco de la aŭtoposedanto”. Adreso: Jølbyvej 9 B, Kopenhago Vanløse, Danlando

Universala Ligo: „La pac-misio de Esperanto en ĉiuj landoj de la mondo”. Adreso: Riouwstraat 172, Den Hago, Nederlando

Skolta Esperantista Ligo. Adreso: S-ro D. Murphy, 7 Constable Road, Ipswich, Britujo

Akademio de Esperanto. Adreso: Wassenaarseweg 11 c, Hago, Nederlando

Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista. Adreso: Frederikstr. 2, Dordrecht, Ned.

Esperanto ŝakligo Internacia. Adreso: D-ro V. Faigl, Zlonice, Ĉeĥoslovakio

Studenta Tutmonda Esperantista Ligo: „La problemoj de la intensa specialiĝo en la hodiaŭaj universitatoj”. S-ro Victor Sadler, 1 Poet's Road, Highbury, Londono N. 5, Britujo

Interrilata Centro Internacia de Esperantistaj Kampadistoj: „Kampado kaj turismo eksterlande dank'al Esperanto”. Adreso: 12, Avenue Alsace-Lorraine, Chartres (E & L), Francujo

Mondpaca Esperantista Movado: „El kio konsistas la respondeco de la esperantistoj por la paco”. Adreso: D-ro Adolf Halbedl, Knittelfeld, Bahnstr. 45, Aŭstrujo

Internacia Geografia Asocio. Adreso: Kondina 24, Beograd, Jugoslavio

Internacia Societo de Arkitektoj kaj Konstruistoj Esperantistoj, 112, Oxford Avenue, Southampton, Britujo.

**BANKEDO:** La Loka Kongresa Komitato decidis, ke dum la Kongreso okazu festa Bankedo en la Hotelo Crown de Harrogate, honore al la esperantistaj artistoj. Detaloj aperos en la Dua Bulteno.

**FOTO-EKSPOZICIO:** En la kadro de la Arta Festivalo estas organizata en Harrogate Foto-Ekspozicio sub la titolo „La Homaro”. Rajtas partopreni ĉiu esperantisto fotografanto: ĉiu ekspoziciota verko havu motivon de homa persono, vivo agado, popola kutimo aŭ vivkondiĉoj, en la plej vasta senco de la vortoj. Ĉiu ekspozicianto rajtas sendi maksimume kvar nigrablankajn kopiojn pri ĉiu

lando, kiun la bildoj prezentas, kaj/aŭ kvar kolorajn diapozitivojn. La Ekspozicia Regularo estos aparte publikigata kaj aperos ankaŭ en la Dua Bulteno.

**FIGURAJ KAJ PLASTIKAJ ARTOJ** : En la kadro de la Arta Festivalo estas organizata en Harrogate Ekspozicio pri figuraj kaj plastikaj artoj. La celo de la Ekspozicio estas elmontri la kreaĵojn de la esperantistoj en la plej variaj formoj de konkretaj artoj, inkluzive de hejmarto (slojdoj). Verkojn povas sendi diplomitaj artistoj, studentoj de arta lernejo, personoj, kiuj jam ekspoziciis, personoj, kiuj ne ekspoziciis, sed kiuj povas ricevi por sia verko rekomendon de iu artfakulo de sia lando. La branĉoj de la Ekspozicio estas: pentraĵoj (olefarbo, akvarelo, guaŝo), glumuntaĵoj, reliefaj bildoj, aliaj grafikaj verkoj (per ĉina inko, kreto, paŝtelo, k.c.), gravuraĵoj, akvafortoj, ksilografioj, linolgravuroj, skulptaĵoj kaj bareliefoj el ŝtono, ligno aŭ alia taŭga materialo, inkluzive de hejmaj artikloj, ceramiko, mozaiko, terakoto, brodaĵoj, teksaĵoj, tapiŝoj, mane presitaj ŝtofoj, punktoj, pupoj kaj marionetoj.

La Ekspozicia Regularo estos aparte publikigata kaj aperos ankaŭ en la Dua Bulteno.

STATISTIKO (ĝis fino de decembro) 586 el 28 landoj (pasintjare 639 el 33 landoj).

### ANTVERPENANOJ ATENTU!

Ni intencas starigi esperantan horgrupon porinfanan. Nunmomente ni disponas jam pri deko da geknaboj. Tamen, tio ne sufiĉas. Ni volus almenaŭ duobligi nian grupeton. Tial ni petas ĉies kunlaboron. Sendu al ni kiom eble plej multe da geknaboj inter 6 kaj 14 jaraj. Eĉ infanoj kiuj scias eĉ ne unu vorton de Esperanto, estas bonvenaj, ĉar ni intencas ne instrui, sed almenaŭ havigi al ili iun scion de la lingvo pere de la kantoj mem.

La kunvenoj okazos ĉiun sabaton ĝis la paska libertempo, de la 2.h.30 ĝis la 4.h., je ĉisuba adreso:

*S-ro Rik de Roover, Luchtvaartstr. 28 Borgerhout (Antverpeno). Tel. (03) 39,42.94*

Venigu ilin la unuevenontan sabaton. Kompreneble, ĉio estos senpaga.

Por la bono de Esperanto, apogu nian iniciaton!!

La gepatroj aŭ la eventualaj gvidantoj de la infanoj povas ĉeesti la kunvenojn. Ni kalkulas je via helpo! Antaŭdankon!

### LA OFICIALA KAJ INTERNACIA SPECIMENFOIRO DE BARCELONA (Hispanujo) UZAS ESPERANTON

Same kiel en 1960 ankaŭ en la nuna jaro tiu foiro (unu el la plej gravaj) eldonas sian oficialan afiŝon en Esperanto.

Temas pri belega afiŝo kun moderna plurkolora desegno en la formatoj 70 × 100 cm. kaj 30 × 40 cm. Belega por ekspozicio!

Tiun juvelon oni povas ricevi senpage, sed estus utile ke la petantoj menciu kie la afiŝo estos montrata (vendejo, turismoficejo, stacidomo k.t.p.) ĉar la celo ja estas propagandi la foiron ĉie.

Interesitoj turnu sin al: *Feria Oficial e Internacional de Muestras, Negociado de Propaganda, Paseo de Maria Cristina, BARCELONA - 4.*





**CLAVE DE ESPERANTO** — 4-a urugvaja preso de la hispana ŝlosilo, eldonita de Urugvaja Esperanto-Societo honore al Zamenhof je lia centjara jubileo. 32 pĝ. + 8-paĝa duobla kovrilo kun ĝisdataj informoj kaj adresoj de hispanlingvaj landaj informoj kaj modeloj de leteroj. Prezo 0,30 ned. gld. Mendu specimenon je unu respondkuponon ĉe Yaguaron 1397, Montevideo, Urugvajo. —

La diverslingvaj ŝlosiloj de Esperanto estas jam tre malnovaj; la fakto ke oni ĉiam denove re-eldonas ilin, estas pruvo ke ili taŭgas. Skribante simplastilan leteron al ne-esperantisto en iu fremda lando, oni

aldonas ŝlosileton en la koncerna lingvo, kaj la ricevanto kun iom da lingvoscio povas facile, helpe de la enpresita konciza gramatiko kaj vortaro, deĉifri la leteron. \*

**SEKRETOJ DE LA MARESTAĴOJ**, verkita de *Petar Giunio*, reverkita de *Lic. Marinko Ĝivoje*. Eldonis *Kroatia Esperanto-Servo*, Zagreb, 1960. — 15 × 22,5 cm. 114 paĝoj, 73 bildoj, el kiuj kelkaj plurkoloraj. Prezo 5 ned. gld. = 20 steloj. broŝ. Havebla ĉe nia Libro-Servo. —

Jen denove verko, je kiu la esperantistaro povas esti fiera! La vigla priskribo, en formo de ekskurso en la marprofundoj, estas kiel romano: ne estas seka listo de nomoj kaj ciferoj, sed ĉiu ĉapitro rakontas pri speco da fiŝoj aŭ vegetaĵoj, kaj la leganto ofte retenas la spiron ĉe tiuj intereseĝaj, nekonataj aferoj. La plej profundan impreson, kiun vekas la verko, estas admiro por la saĝeco de la Kreanto, kiu donis al ĉiu, ofte ŝajne stulta kaj nesignifa estaĵo, ruzan instinkton por defendi sin kaj sian idaron, la kapablon por trovi la plej bonajn lokojn kaj cirkonstancojn por sekurigi la daŭrigon de sia specio. Kvankam en enkonduka ĉapitro „Kiel ekestis la maro kaj la vivo en ĝi?” la aŭtoro tute simple diras, ke ĉiu vivo, ankaŭ la homa, devenas post milionjara evoluado el la senviva materio troviĝanta en la maroj, oni povas trovi klarigon nur akceptante la eternan saĝecon de ĉiopova Kreanto: kiel la eksprezidanto de la novjorka Akademio de Sciencoj, *A. Cressy Morrison*, tiel trafe esprimas en sia verko „La Homo ne staras sola”, ke la sciencisto nur povas rekoni la ekziston de racia Kreinto kaj ke la progreso en la scienco pri la naturo kondukas nin ĉiam pli proksimen al Dio.

Listoj de neologismoj kaj fakterminoj, kaj de la bildoj, notoj pri la aŭtoro kaj aldono koncerne la dum la presado de la libro atingitajn novajn rezultojn sur la kampo de frajado de angiloj, kompletigas la tre interesan verkon, kiu estas serioza atesto pri la uzeblo de Esperanto por sciencaj kaj popularaj temoj. Ĝi devas troviĝi en la biblioteko de ĉiu esperantisto. \*

**KANTU KUNE**, kantareto kun muziknotoj de *Roman Dobrzynski* kaj *Tadeusz Jarzecki*. 11 × 16,5 cm. 48 pĝ. sur bona papero en plaĉa kovrilo, Eldonis *Pola Esperanto-Asocio*, *Filio Varsovio*, ĉe *Ars Polona*. Prezo 1,25 gld. = 5 steloj. — 21 viglaj kantoj el diversaj lingvoj, inter ili famkonataj kiel „Hej Lili” kaj „Que será, será” certe provizos multajn klubkunvenojn pri nova materialo. Havebla ĉe nia Libro-Servo. \*

**ADRESARO DE FIRMOJ KIUJ UZAS ESPERANTON EN LA INTERNA-CIAJ RILATOJ**. Eld. Centro por Esperanto en Komerco, Industrio kaj Turismo (CEKIT) Piazza Oberdan 1, Milano, Italujo. 1960. ĉ. 24 × 17 cm. 40 pĝ. broŝ. Prezo 200 liroj = 5 steloj.

Estas „prova listo“, ĉar CEKIT atendas ankoraŭ multajn anoncojn, kiuj estos senpage menciataj en sekvonta(j) eldono(j). Estas menciitaj pli ol 300 firmoj, alfabete aranĝitaj a) laŭnome; b) laŭ fakoj kaj varoj; c) laŭ (ĝis nun 28) nacioj. La broŝuro enhavas ankaŭ liston kun adresoj en 60 landoj de la tuta mondo, kie oni povas akiri informojn pri Esperanto. Firmoj kiuj uzas Esperanton, estas petataj, sendi nomon (kun esperanta traduko kiam ĝi ne estas persona nomo), precizan adreson, telefonon, telegrafadreson, kun indiko de la artikoloj kiujn oni vendas aŭ fabrikas, kaj de la nomo(j) de la persono(j) kiu(j) parolas aŭ skribas Esperanton. Ankaŭ firmoj kiuj ne havas oficiston-esperantiston, sed uzas la servojn de loka esperantisto aŭ grupo, rajtas senpage ensendi supremenciitajn indikojn. Ni esperas ke la venonta aldono estos jam dika adresaro! \*

**HAMBURG:** 16-paĝa faldfolio 20 × 9.5 cm. kun 8 fotoj kaj 8 artistikaj koloraj desegnoj. Teksto en Esperanto. Eldonitaj de kaj senpage haveblaj ĉe: *Fremdenverkehrsverein der Freien und Hansestadt Hamburg e.V.; Lombardsbrücke 1, Hamburg, Germanujo.* \*

**CORRIERE NUOVA EUROPA** (*Revuo Nova Eŭropo*), 1960, dua jaro no. 4-5. Granda ilustrita monata revuo multlingva. Multaj artikoloj pri diversaj interesaj temoj el pluraj landoj, en pluraj lingvoj: itala, angla, franca, germana, nederlanda kaj ankaŭ unu en Esperanto, nome: „Al la samideanoj!“ de s-ro Aldo Schmuckner; de ĉi tiu artikolo tuj sekvas la itala traduko. Prezo de la unuopa kajero 200 liroj; jarabono de ĉi tiu „Insulo de paco kaj frateco internacia“ kostas ekz. por Italujo 2000 lirojn, por Nederlando 30,— guld., por Belgujo 200,— Bfr. ktp. Ŝajnas al ni, ke oni faris eraron en la kotizo por Nederlando. Adreso: Via Corsica 9, Genova, Italujo. \*


**ESPERANTO, LA LINGVO INTERNACIA, FACILA POR VI.** Internacia amuza lernolibro por lerni sen instruisto, de *Carl Walter*, kun multaj desegnoj de *P. Thienhaus* kaj *W. Drachholz*. 120 pĝ. 15 × 21 cm. Prezo 5,70 NF, 4,50 ned. gld. = 18 steloj. Eldonis: Editions NOVA, 40 avenue Gustave-Dollfuss, *Mulhouse, Francujo.* — Estas la tria eldono de la fama, en 1932 unue de „Heroldo de Esperanto“ eldonita „Gaja lernolibro de Esperanto“, en freŝa verda kovrilo, sur kiu la subtitolo „facila por VI“ estas menciata en diversaj lingvoj. La enkonduka, klariga teksto estas verkita en Esperanto kaj en 11 naciaj lingvoj. Se necese oni pretas presi la enkondukon en pluaj lingvoj, sur apartaj aldonaj folioj. La teksto estas nur en Esperanto kaj bone taŭgas por lerni ĉiutagajn vortojn kaj esprimi sin en simpla stilo. \*

**NUR TRI KOLOROJN**, originale verkita en Esperanto de *Eli Urbanová*, kun foto de la juna ĉeĥa poetino kaj prezento de *Julio Baghy*, ilustraĵoj de *Karel Oberthor*. Beletraj kajeroj de STAFETO No. 3, 1960: 12 × 19 cm., 140 pĝ. Prezo: 4 ned. gld. = 16 steloj. — La jam tre konata eldonejo de la Kanariaj Insuloj denove prezentas al ni poemaron, ĉifoje de ankoraŭ nekonata, tamen mirinde lerta poetino. Por maturaj ŝatantoj de poezio rekomendinda libro. \*

**UNUA SONORILO EN LA MONDO KUN ESPERANTA ENSKRIBO:** „Gloro al Dio kaj sur la Tero Paco. Sankta Familio protektu nin. Ho Dio donu pacon kaj reunigon. F. W. Schilling, Heidelberg fandis min 1959 por Stockum.“ Titolo kaj teksto troviĝas sur la adresflanko de bela poŝtkarto kun bondeziroj en Esperanto kaj en germana lingvo. Certe bonega ideo por la propagando de nia lingvo inter germanlingvanoj. Eldonis *Cramers Kunstanstalt K.G. Dortmund.* Prezo ne estas menciata, sed petu informojn ĉe s-ano *Josef König, (21b) Stockum/Sauerland, Esperantotr. 4.*

*T. Durenkamp.*





*Horizontale:*

- A. loko, kie oni kaŝas sin por surprize ataki malamikon; plivastigi laŭ ĉiuj dimensioj (r).
- B. studu; parto de la kapo (r).
- C. rebuso (r); timegiga (r).
- D. algo; muzikinstrumento, konsistanta el granda metala disko, vertikale pendanta, kiun oni frapas (r).
- E. plialtigi; persona pronomo
- F. papa ambasadoro; pastro de Budao ĉe Tibetanoj kaj Mongoloj.
- G. tre malgranda aperturo (r); ŝlima terspaco kovrita de neprofunda senflua akvo;
- H. aerostato; kulturi kaj eduki bestojn por la uzado de la homo (r).
- I. perfekta horizontala ebeneco (r); granda ŝtono nature firme fiksita en iu loko.

- J. bezonanta ripozon, pro eluzo de siaj fortoj per troa penado (r); dramo, en kiu la aktoroj ne parolas sed kantas kun akompano de orkestro; persona pronomo.
- K. konjunkcio;
- L. ĝenerala nomo de ĉiuj produktaĵoj, uzataj por plibonigi la kulturgrundojn (r); improvizita baraĵo kontraŭ atako (r).
- M. ne kontraŭstari al io, kio malplaĉas, ĝenas aŭ suferigas, kvankam oni kapablas malhelpi ĝin (r); kristana festo de la Tri Reĝoj (r).
- N. longkrura birdo; astro (r).
- O. inklino fari ian agon, akirita pro ofta ripetado de tiu ago; planto kun belaj brilkoloraj floroj (r).
- P. finiĝo de verbo en la estonta tempo; rigardi (r); montri subitan gajecon (r).

*Vertikale:*

- I. tre granda kvarpiedulo (r); arto reliefe reprodukti la formojn de objektoj.
- II. listo de manĝaĵoj (r); granda aro de domoj, dismetitaj laŭ stratoj (r); veturilo (r).
- III. longkvadrata peco el bakita argilo, uzata por konstrui (r); delikata, apenaŭ sentebla diferenco inter gradoj kaj kombinoj de iu koloro (r); plej elektitaro (r).
- IV. parto de la fingro; aldirekti ĵeton, pafon aŭ atakon por trafi ion; ilo, por reprodukti per metalaj literoj, ŝmiritaj per inko (r).
- V. difinita kvanto da mono (r); loĝanto de orient-eŭropa lando; prepozicio kun la senco; ne nur - sed ankaŭ.
- VI. trinkaĵo; parenco (r).
- VII. muzika tono, malproksima de aliaj je ok gradoj (r); grasa fluaĵo (r); pinta, korna ekstremaĵo de la buŝo de la birdoj (r).
- VIII. plata ligna ilo kun longa tenilo, uzata por movi ŝipon (r); subteni kaj firmigi objekton pere de alia;
- IX. peco (r); parfuma substanco, eltirita el intestoj de makrocefalo; tio, kio servas por atingi celon (r).

- X. orda numeralo; vasta etendaĵo da sala akvo, kiu kovras plej grandan parton de la terglobo; skribsigno de nombroj (r).  
 XI. solida (r); palmo; inflamo de muka membrano (r).  
 XII. elekti (r); membro (r); persona pronomo.  
 XIII. zorgi por eviti minacantan danĝeron aŭ eblan malbonon al iu; fari partojn el tuto (r).

*Li de Jong-Roobeek.*

## SOLVO DE LA KRUCVORTENIGMO SUR P. 18.

### *Horizontale:*

A. kvereli; tabak. B. aŭtor; naiva. C. plebo; erpil. D. apro; arkado. E. alte; al. F. lavang; olimp. G. arabo; adiaŭ. H. blanka; metr. I. utile; port. J. rat; merlo; oaz. K. ov. L. gitar; arsenik. M. raŭpo; rektoro. N. adres; akvum. O. mikrob; tarifo. P. ol; fam; ĝis.

### *Vertikale:*

I. kapabla; programo. II. vulp; arb; aviadil. III. eter; valut; turk. IV. robo; abat; papero. V. ero; anonim; roso. VI. alg; kle. VII. inert; aer; ara. VIII. arkeo; rekta. IX. tipa; lampo; skvam. X. avid; ideo; vetur. XI. balo; mitro; nomiĝ. XII. aparta; ir; fi. XIII. kukol; kokos.



*Esperanto-filatelistoj!* Kiu povas oferti al mi ne-uzitajn Esperanto-poŝtmarkojn Mi serĉas por statistikaj kaj propagandaj celoj kelkajn seriojn jugoslavajn, hungarajn (nur tranĉitajn!), brazilajn (eldonitajn en 1935, 1936, 1945) kaj rusajn (la tranĉitajn markojn — 40 jarojn Esperanto — po kun kaj sen

filigramoj, la tranĉitan markon — telegrafejo en Moskvo — kaj la markon *Popov* in inversa surpriso de „8 kop.”). Mi egaligos tute laŭdezire ĉu esperantaje, ĉu per pago de IKUE- aŭ UEA-jarkotizo, ĉu per abonpago de kiu ajn Esperantogazeto ktp. — *Josef Merz*, Hauptstr. 14, *Sackenbach-Lohr a. Main, Germana Federacia Respubliko.* \*

S-ro Giovanni Tanzi, Via Bronzetti 38, *Milano, Italujo*, interŝanĝas poŝtmarkojn tutmondajn kaj esperantajn glumarkojn. \*

Laŭ ĉi tiu vojo ni komunikas al ĉiuj niaj geamikoj esperantistaj, kie ajn en la mondo, ke ni la 25-an de januaro 1961 geedziĝis. Ni dankas al la lingvo Esperanto, ke ni trovis unu la alian, ĉar ni interkonatiĝis dum la 44-a Universala Kongreso de Esperanto en Varsovio. Dankon al ĉiuj, kiuj sendis al ni siajn gratulojn kaj bondezirojn! Bonvolu noti nian novan adreson: *Ges-roj Tuinder-Dekker*, Marktweg 95, *Hago, Nederlando.* \*

Mi volas interŝanĝi alometetiketojn de Ĉeĥoslovakujo, Rusujo kaj Hungarujo kontraŭ tiuj de aliaj landoj. Laŭdezire mi ankaŭ rekompencas per esp. tradukoj de ĉeĥaj naciaj mitoj, legendoj kaj marionet-ludoj. Mi volas interesigi aliajn kolektantojn por Esperanto, montrante mian plej internacian kolekton akiritan pere de nia lingvo. S-ro *L. Ryznar, Svitavy Lány, Ĉeĥoslovakujo.* \*



## RADIO-PROGRAMOJ DE LA VOĈO DE AMERIKO EN ESPERANTO

17 Marto - 24 Marto - 31 Marto - 7 Aprilo 1961

0330 - 0400 GMT (horsistemo de Greenwich)	19.83 metroj 16.92 m	15130 kilocikloj 17735 kcs	ĉefe por Suda, Centra kaj Norda Ameriko
1100 - 1130 GMT	41.92 m	7155 kcs	ĉefe por Orienta Azio
1200 - 1230 GMT	19.72 m	15210 kcs	ĉefe por Sudorienta Azio
2200 - 2230 GMT	31.20 m 48.62 m	9615 kcs 6170 kcs	ĉefe por Eŭropo kaj la apudaj regionoj de Azio kaj Afriko

Ĉiu elsendo estos aŭdebla ankaŭ en aliaj partoj de la mondo. Bonvolu atenti, ke la disaŭdigo de 0330 GMT estas aŭdebla en la amerikaj landoj en la nokto inter jaŭdo kaj vendredo, sed ke la aliaj disaŭdigoj atingas la aŭskultantojn en la regionoj menciitaj en la nokto inter vendredo kaj sabato.

0330 GMT estas la 9-a kaj duono jaŭde vespere en Meksiko, Gvatemalo, Nikaragvo, Honduraso, Kostariko, Salvadoro, Usono (CST) kaj Kanado (CST), la 10-a kaj duono en Kolombio, Kubo, Haitio, Dominikana Respubliko, Panamo, Peruo, Usono (EST) kaj Kanado (EST), la 11-a en Venezuelo, la 11-a kaj duono en Ĉilio, Bolivio, Paragvajo kaj Okcidenta Brazilo, la duono post noktmezo en Argentino, Orienta Brazilo kaj Urugvajo.

1100 GMT estas la 7-a vespere en Ĉinujo, la 7-a kaj duono en Koreo, la 8-a en Japanujo, la 9-a vespere en Orienta Aŭstralio, la 11-a vespere en Novzelando.

1200 GMT estas la 5-a kaj duono vendrede vespere en Hindujo, la 6-a kaj duono en Birmo, la 7-a en Tajlando, la 7-a kaj duono en Indonezio, Malajo kaj Singaporo, la 8-a en Ĉinujo, Vietnamo kaj la Filipinaj Insuloj, la 3-a posttagmeze en la Malgaŝa Respubliko kaj Zanzibaro.

2200 GMT estas la 10-a vespere en Britujo, Portugalujo kaj Maroko, la 11-a vespere en la plimulto de la eŭropaj landoj (Francujo, Italujo, Germanujo, Svedujo, Polujo, Jugoslavujo ktp.), noktmezo en Finnlando, Grekujo, Turkujo, la Unuigita Araba Respubliko, Libano, Bulgarujo, Rumanujo, la 1-a matene (sabate) en Moskvo, Leningrad, Riga, Tallinn, Vilnius.

En logika daŭrigo de la tria serio de Esperanto-programoj de la Voĉo de Ameriko, la kvara serio priskribas Usonon sub ĝia nova Prezidanto John Fitzgerald Kennedy en la kadro de la nuna situacio en Usono kaj la mondo. Sonbildo de gravaj okazaĵoj, raportoj, intervjuoj kaj la bone konata rubriko de Demandoj kaj Respondoj ilustras la bazan idearon, la programon kaj la gvidantajn personojn de la Kennedy-registaro kaj klarigos la rolon de la Prezidanto, de liaj ĉefaj kunlaborantoj, de la Kongreso, de la tribunaloj, de la politikaj partioj kaj de publika opinio.

Demandoj respondotaj en la rubriko de Demandoj kaj Respondoj devas esti ricevataj en Washington kiel eble plej frue.

Raportojn pri la ricevo, opiniesprimojn pri la enhavo kaj demandojn por la rubriko de Demandoj kaj Respondoj bonvolu sendi al D-ro William Solzbacher, Voice of America, Rm. 2528 HEW, Washington 25, D.C., Usono.



**RADIO VARSOVIO** elsendas ĉiutage de 16.30 - 17.00 M.E.T. duonhoran programon en Esperanto sur mallongaj ondoj: 25,09 - 25,16 - 25,42 - 31,01 - 31,45 - 31,50 - 42,11 m. kaj sur meza ondo 249 m. (resp. 11955 - 11925 - 11800 - 9675 - 9540 - 9525 - 1205 kc/s).

**RADIO ROMA** Esperanto-Fako, Casella postale 320, Roma (Italujo).

La dissendoj okazas de h. 18.55 ĝis h. 19.10 (M.E.T.).

Ondlongoj: metroj 30.90 = Mc/s. 9.71; 41.24 = Mc/s 7.27; 50.34 = Mc/s 5.96.

Prelegantoj: marde: alterne S-ro L. MINNAJA kaj Prof. D-ro V. MUSELLA; merkrede: S-ro Luigi MINNAJA; vendrede: Prof. D-ro Vincenzo MUSELLA.

## FEBRUARO 1961

1: Kuriero de Esperanto; 3: Italaj komponistoj: Francesco Cilea; 7: Tra la literaturo; 8: Kuriero de Esperanto; 10: Leterkesto kaj bibliografio; 14: Novajoj el Italujo; 15: Kuriero de Esperanto; 17: Bonfara arto: la komika aktoro itala-usona Jimmi Savo; 21: Italaj kanzonoj en Esperanto; 22: Kuriero de Esperanto; 24: La itala skulptisto Sansovino; 28: Italaj arkeologiaj urboj: Sperlonga.



Recenzoj pri: Grand Dictionnaire Espéranto-Français, de G. Waringhien, Paris, 1957:  
 Roger Bernard en: Esperanto, 1958, 165.  
 Teruo Mikami en: Oomoto, 1958, 58-60.  
 W.P.R. (oelofs) en: Scienca Revuo, vol. 10, 1959, 135-136.  
 André Albault en: Franca Esperantisto, 1959, 13-15.



- Kio estas la avareco?
- Ŝparkaso por la heredontoj.
- Kion vi deziras por via naskiĝtago, kara edzo?
- Nur tre etan aferon, ĉar momente mankas al mi la mono.

*Edzino* : — Ĉi tiu loĝejo estas terura! La muroj estas tiel maldikaj, ke la najbaroj aŭdas ĉion kiun ni preparolas.

*Edzo* : — Nu, mi petos la domposedanton, ke li plidikigos la murojn.

*Edzino* : — Tute ne! Tiam ni nenion povus ekscii de kio okazas ĉe niaj najbaroj!

*Edzino*: Ĉu vi pensas, ke mi dum mia tuta vivo portos ĉi tiun panteran haŭton?

*Edzo*: Sed kial ne? La pantero ja ankaŭ portas ĝin la tutan vivon!